Aperas almenaŭ 8-paĝa kun 4-paĝa aldono „2. Sprache für Alle“ la 10. de l' monato.

Iras tutmonden

Aŭstria Esperantisto

Oficiala organo de Internacia Esperanto-Muzeo, Aŭstria Esperanto-Asocio, Esperanto-Varbadservo p. Aŭstrio

Leteradreso: Wien, I., Neue Burg. Telefono R-27-803.
Jarabono komencebla ĉiumonate por **Aŭstria** ŝ 4.00, **aliaj landoj** svfr. 4.25 (9 poŝtrespondkuponoj). Poŝtŝparkaso-konto aŭstria D 123.820.
Ne ĝustatempa malmendo de nia gazeto devigas al plupago de la jarkotizo por la sekvonta jaro

N-ro 3 (152) Korneuburg ĉe Wien, la 10. marto 1938. 15. jaro

„Ĝis la morto Ruĝ-blank-ruĝa! Vivu Aŭstrio!

La duhora parolado, kiun faris federacia kanceliero de Aŭstrio d-ro Kurt von Schuschnigg en la festa kunsidsalonego, en kiu dum 40 jaroj la deputitaro de la iama imperio aŭstria kunvenis, antaŭ „Bundestag“ (la leĝdonanta korporacio de Aŭstrio) interesis la tutan mondon. Pro tio la parolado estis disaŭdigita per Radio-Wien kaj relajse akceptita de preskaŭ ĉiuj landoj eŭropaj kaj amerikaj. — Por niaj legantoj en- kaj eksterlandaj ni tial publikigas la ĉefajn punktojn kaj esperas ilian konsenton.

„La pligrandigita nombro de miaj kunlaborantoj en la registaro montras klare, ke la responda ŝtatgvidantaro sin vidas antaŭ specialaj taskoj, kiujn solvi ĝi sub ĉiuj cirkonstancoj decidis.

La sola punkto de la hodiaŭa tagordo estas **Aŭstrio.**

La registaro kun ĉiuj siaj membroj nešanceliĝeble staras sur la fundamento de la konstitucio de 1. de majo 1934. Ĝia unua kaj memkomprenebla devo estas, konservi per ĉiuj siaj fortoj la netuŝeblan liberecon kaj sendependecon de la aŭstria patrolando. Ĝi vidas sian taskon en tio, certigi la pacon eksteren per ĉiuj al ĝi disponeblaj eblecoj kaj larĝigi kaj konservi la pacon interne laŭ plej bona scio kaj konscio. En la plenumo de ĉi tiu tasko la aŭstria registaro vidas sian plenan kaj senliman, de la tuta forto de la konvinko portatan konfeson al sia germana devo.“

„En kio nun konsistas la lasta senco de la memstara kaj sendependa Aŭstrio, kiel Engelbert Dollfuß ĝin volis, kies heredaĵon ni transprenis en grava tempo?

La luktado pro la sendependeco havas sencon, kiam sukcesas, ebenigi al la germana popolo en Aŭstrio en ĉiuj ĝiaj tavoloj la vojojn al feliĉo kaj bonstato, al pano kaj libera vivospaco, al prospera evoluiĝo; fermi la vundojn, kiujn malfeliĉa milito kaj fatala paco en Aŭstrio kaj same al la laŭnombre malgrandaj fremdpopolaj malplimultoj, kiuj havas sur nia tero sian patrolandon.

Sed la luktado pro la sendependeco ankaŭ havas sencon ĉar ni servas al principo, kiu preskaŭ antaŭ duonmiljaro sur Reichstag en Worms sub imperiestro Maximilian trovis sian precizan esprimon kaj al kiu ni nin sentas devigataj en nia konscio; kiu donis sian sencon al Wien en la epokoj de Maria Theresia kaj Franz Josef, kiu kiel sola lumradio post la renversiĝo en 1918 restis al venkita, senrajtigita, konfuzita popolo; kiu poste reprezentas la sanktan flamon, kiu estis gardata de la vivocelo de Ignaz Seipel, por kiu Engelbert Dollfuß mortis; kiu al mi, kiu nuntempe devas porti la tutan respondecon por la politiko en nia lando, estas la decida motoro de la politika pensado, volo kaj agado: La fundamenta leĝo de la harmonio de nia kulturo, pro kiu la vivo šajnas al ni vivinda kaj homdigna, konsistanta el la kompleta harmonio de klasikaj-humanismaj, naciaj-germanaj kaj kristanaj-orientaj elementoj. Tio parolas el la vizaĝo de nia germana pejzaĝo, el niaj loĝlokoj, bildoj kaj konstruaĵoj, kantoj kaj kutimoj, artoj, zorgoj kaj historio. Tio parolas el la vizaĝo de centmiloj de niaj germanaj homoj, de iliaj familisorto kaj nomoj, ilia temperamento kaj sentaro, ilia akomodiĝkapablo kaj šatateco en la mondo, dialekto, ilia kredemo kaj ilia liberecvolo. Tio parolas el la vivoritmo de la patrolando:

tion volas, tia estas la germana Aŭstriano!



Sub „Krucken-kruco“ la prezidantaro de Bundestag, ĉe la pupitro d-ro von Schuschnigg, antaŭ li la ministraro kaj la busto de Dollfuß en la mezo.

Servi al li kaj per tio al valora parto de la **tuta germana popolo** — en niaj modestaj, sed propraj limoj kunlabori je la tutgermana sorto, denove kiel depost ĉiam — **bone german-fidela, ĉiam aŭstria** — la federacia registaro elektis kiel sian plej altan devon.“

„Mi ne bezonas akcenti, ke alilandaj modeloj havis nenium šancon ĉe ni, ĉar agitvortoj, el ĝiatempaj politikaj situacioj naskitaj, principe nur havu validon interne de la limoj de la propra originlando, sed ankaŭ, ĉar

Aŭstrio surpašis kun la majokonstitucio novajn vojojn.

La konstitucio ne konas partiojn kaj ankaŭ ne partio-ŝtaton. Ĝi entreprenas la profesikorporacian organizon de la popolo, je kio kiel regulanta faktoro estas antaŭvidita la aŭtoritata pinto de la ŝtata gvidado. Tial ankaŭ ne ekzistas koalicioj, nek en la politika vivo nek en la registaro. Tial nia registaro ne povas esti registaro de koalicio, do partioregistaro, sed ĝia ambicio restas, prezenti la koncentrigon de ĉiuj pozitivaj fortoj de nia popolo. Ĉar al ĉiu aŭstriano, kiu estas preta al kunlaboro kaj kiu dediĉas siajn fortojn al la surkonstrulaboro, estas libera la de la registaro montrita vojo al kunlaboro.

Ni prinzipe devas deteni nin de valorjuĝoj pri politikaj instalaĵoj kaj sistemoj, kiuj validas en aliaj landoj. Tial ni ankaŭ povas substreki kun energio, sen timi miskomprenojn, ke

la el la leksikono de la partioštatoj kaj iliaj koalicio-reĝimoj devenanta politika termino de Popolfronto restas por ni aŭstrianoj same neaplikebla kiel ties kontraŭpoluso, la diktatora konstitucio.

Kion ni deziras en Aŭstrio, estas ne la partie ligita Popolfronto, sed la **unuanima, unuiĝinta fronto de nia popolo en ĉiuj ĝiaj sociaj tavoloj kaj korporacioj.“**

„Sinjoro la regnokanceliero kaj gvidanto de la Germana Regno invitis min al buŝa interparolado, kiu okazis la 12. de februaro sur Obersalzberg. La konata kontrakto de 11. julio 1936, kiu estis destinita certigi kaj reguligi la amikajn rilatojn de la ambaŭ germanaj ŝtatoj, estis montrinta en sia efektivigo malfacilaĵojn. La fakto nun, ke ĉi tiu persona interrilato estis taksata malproksime trans niaj limoj kaj de Germana Regno kiel politika sensacio, montras, ke malgraŭ niaj klopodoj ne tute sukcesis, malligi la malharmoniaĵojn, kiuj ŝarĝis depost jaroj sur la germana spaco, sur Aŭstrio kaj Germanlando; stato, laŭ nia certa konvinko ne de ni kaŭzita kaj ne dezirita, kaj daŭre ne tolerebla, ĉar tute nenormala."

„Tiel la tago de Berchtesgaden, kiel mi firme esperas en interkonsento kun la regnokanceliero kaj gvidanto de Germana Regno, estis epokfaraĵo, kiu daŭre kaj por ĉiu estonto estas destinita reguligi la rilatojn de niaj ambaŭ ŝtatoj en la intereso de la tuta germana popolo, de ties kulturo kaj nacia vivo, en la speciala intereso de nia aŭstria patrolando. Limŝtono de la paco."

„En la paso de la historio venis periodoj, dum kiuj germanoj staris kontraŭ germanoj, tempoj de la fratbatalo."

„Kelka fiera parolo estis dirita en la metropoloj de ambaŭ regnoj; unu el la plej belaj, kiun la aŭstriano kaj la germano, kie ajn estu ilia nuna hejmo, plej bone neniam forgesu, estas de Franz Josef: Mi estas germana princo."

„Aŭstrio staras kaj falas kun sia germana misio."

„Dum preskaŭ 100 jaroj la germana demando ne silentis en ĉi tiu lando. La germanoj, disigitaj en kelkdekduoj de politikaj nuancoj, luktadis pri tio, kiu envere estas la pli bona germano. Kaj tamen laŭ mia plej forta konvinko la plej bona germano en ĉi tiu lando estis ĉiam la fidela aŭstriano."

„Ni, dank' al Dio, superis la karakteron kaj la parolojn de la renversiĝtempo, kiuj minacis pereigi la reston de Aŭstrio. Ne estas juste, kondamni per kolektiva juĝo ĉiujn, kiuj tiam en la tiama Aŭstrio certe portis ne facilan respondecon. La ĝenerala mizero, la malsato, konfuzo, perdigis la konscion. Al tio venis la packontrakto, kiun kontraŭbatali ni neniam ĉesis, la mensogo pri militkulpo."

„Kiam Engelbert Dollfuß (27. 5. 1932) ekregis, li diris solene: ‚Ĉiu mondo devas kompreni, ke ni kiel memstara, germana ŝtato, kondiĉita per la sango, historio kaj geografia situo de nia patrolando, estas konsciaj pri la plej intima interligiteco kaj amikeco kun la Germana Regno, amikeco, kiu rajtigas kaj devigas.' "

„Kaj malgraŭ tio venis interfratluktado; kun ĉiuj siaj suferoj kaj teruraĵoj, ... kaj ĉi tiu luktado daŭris kvin jarojn."

Nun estu paco!

Paco, kiu estas justa por ambaŭ partoj, honora paco, kiu finas luktadon, kiu estis farata tro longe kun neegalaj armiloj; luktado, kiu certe ne estis en la intereso de la germana popolo kaj de la germana spaco, kiel ajn oni deziras vidi ties idealan formadon; kiu devis dolorigi ĉiun germanon kaj fine enhavis amason de danĝeroj por la konservo de la ĝenerala paco, al kiu ĉiuj ŝtatoj estas sammezure interesataj.

Ĉi tiu pacigo post kvinjara interfratluktado estis la senco kaj la celo de la renkontiĝo en Berchtesgaden la 12. de februaro ... Por montri la honestan volon de nia lando, fini la tempon de la malakordo, mi memorigas pri la lastaj vortoj de la mortanta kanceliero Dollfuß: „Mi ja nur volis la pacon. Ni neniam atakis, ni ĉiam devis nin defendi, Dio pardonu ilin!" Mortanto ne mensogas. Li ĉiam parolas la veron.

Tio estis la sama Dollfuß, kies vojon iri ni estas pretaj, kaj kiu en aprilo 1933 diris en granda kunveno: „Ni aŭstrianoj estas plene kaj tute konsciaj pri nia sorto-interligiteco kun la tuta germana popolo" kaj la 11. septembro 1933: „Ni aŭstrianoj estas germanaj kaj havas germanan landon." Kaj mi diris la 29. majo 1935: „Aŭstrio neniam lasis dubon pri tio kaj tion ankaŭ ne faros en estonto, kiom longe ni vivas, ke ĝi konfesas esti germana ŝtato."

„La regnokanceliero kaj gvidanto de Germana Regno en sia granda parolado al la germana nacio la 20. februaro nomis la interkonsenton de Berchtesgaden kompletigon en la kadro de la interkonsento de 11. julio 1936, kiu enhavas la decidan konstaton de la regnokanceliero kaj gvidanto de Germana Regno, ke la germana regnoregistaro rekonas la plenan suverenecon de Federacia Ŝtato Aŭstrio. Plue ĝi enhavas la konstaton, ke la ambaŭ registaroj rigardas la en la alia lando ekzistantan internpolitikan formiĝon inklusive la demandon koncerne la aŭstrian nacisocialismon kiel internan aferon de la alia lando, al kiu ili nek senpere nek pere faros influon. Ĝi enhavas fine la konstaton, ke la aŭstria registaro faros sian politikon ĝenerale kaj speciale koncerne Germanan Regnon sur tiu principa linio, kiu respondas al la fakto, ke Aŭstrio konfesas esti germana ŝtato. Je tio estu aludite al la Romaj Protokoloj, kiuj reguligas la pozicion de Aŭstrio al ties najbaroj Italujo kaj Hungarujo."

„Ne mankis provoj ambaŭflanke superi iam denove estiĝintajn malhelpaĵojn kaj konfliktojn. La lasta provo en Aŭstrio estis en februaro 1937, kiam inter alie ‚Komitato de la sep' en Wien ekfunkciis por la celo de internlanda interpaciĝo. La per subskriboj speciale fiksita kaj akceptita ‚ĉefkondiĉo', de ĉi tiu intertrakto, kiu okazis sen kunlaboro de regnogermanaj instancoj, estis la **rekono de la konstitucio de 1. majo 1934, la rekono de Patriota Fronto** kiel solan portanton de la politika volo en Aŭstrio kaj la **rezigno je ĉiu kontraŭleĝa agado,** kies lasta celo nur ĉiam denove povis esti la starigo de NSDAP kaj per tio kontraŭagis la konstitucion, je kiu okazo ambaŭ partioj subskribis, ke estonta kontraŭleĝa agado kiel ĝis nun, estos laŭ la leĝoj punata. Kaj ni faris vastan politikan amnestion kaj ripetis la principon, ke la kunlaboro en Patriota Fronto estas senĝene libera al ĉiu aŭstriano, kiu estas preta al laŭleĝa vojo, egale al kiu politika direkto li antaŭe apartenis. Tio estis en **februaro 1937...** Ke ĉi tiu vojo **ne kondukis al la dezirita sukceso** havas sian kaŭzon en tio, ke **aŭstriaj interesuloj opiniis** ĝuste, malhelpi kaj venenigi per malĝustaj informoj la interŝtatajn rilatojn kaj, kiel vidiĝas el diversaj pamfletoj, turni en la kontraŭon la sencon de la kontrakto de l' 11. julio kaj la klare esprimitan volon de la regnokanceliero kaj gvidanto de Germana Regno, por per tio certigi al si la eblecon de nova

Arbaro.

Romano el la antaŭa Aŭstrio de Hans von Hammerstein.

Hans Freiherr von Hammerstein-Equord, nuntempe Federacia Komisaro por Kulturpropagando, faris siajn jurajn studojn en Marburg ĉe Lahn, München kaj Wien, 1905 venis en la politikan administradon en Supra Aŭstrio, estis distriktestro en Braunau de 1923—33, 1934 sekurec-direktoro por Supra Aŭstrio, poste ĝis oktobro 1935 Ŝtatsekretario por Sekurecaferoj, majo ĝis nov. 1936 Ministro por Justeco. — La verkinto servis dum la granda milito 4 jarojn ĉe la frontoj en Rusujo kaj Italujo kiel eskadronestro ĉe 6-a ulano-regimento. Baron Hammerstein-Equord verkis krome jenajn: 1912 „La blua floro", fabelo; 1913 „Roland kaj Rotraut", fabel-romano; 1916 „Februaro" (r.); 1917 „Walpurga", legendo; 1918 „Inter revado kaj tagiĝo", poemoj; 1918 „Kastelo Rendez-vous", epika poemo; 1919 „La taglibro de la naturo" (p.); 1921 „Kavaliro, morto kaj diablo" (historia r.); 1922 „Mangold de Eberstein" (hist. r.); 1925 „La Hungaroj", novelo; 1929 „La Azoj" (ep. p..); 1933 „La finnaj rajdistoj" (hist. r.); 1935 „La migranto dum vespero" (p.); 1935 „La kultura vizaĝo de Aŭstrio, prelego; 1936 „Cipripedio kaj aliaj fabeloj"; 1936 „La flava muro" (r.) kaj 1937 „La renaskiĝo de la humaneco", prelegoj.

La malgranda forstista domo kun sia laŭboforma lignoverando kaj la verdaj fenestrokovriloj situas ĉarme sur erikeja altaĵo ĉe l' rando de la altarbaro. Ne tre kulturata estis tiam ĝia pli proksima ĉirkaŭaĵo. Bestofeloj, etendigitaj sur tabuloj, estis en la suno pro sekiĝo, vulpo- kaj kesto-kaptiloj kuŝis tie kaj tie, kaj el la malhelo de kaĝo, kiu estis plena de malpuraĵo kaj furaĝrestaĵoj, brilis la okuloj de gufo, kiu kolere spiraĉis kaj krakis, se oni venis en la proksimecon. Kaj la kavigitan trunkon de larĝa piceo, al kiu ronda lignodisko kiel pordeto estis antaŭnajlita, elrampis grumblante ostaro de hundo, unu el tiuj bedaŭrindaj kreitaĵoj, kiujn najbaroj transdonis al la maljuna Tauchen por dresado kaj enkonduko en la altan ĉasteknikon.

Kiel multaj edukistoj ankaŭ Tauchen havis la opinion, ke oni povas kontraŭagi la dubajn karakterecojn speciale efike per la stomako, kaj malsato estis tial ĉe li la komenco de ĉiu dresado.

La tirado, kiun mi faris per la pordotintilo, kaŭzis en la ĉarma dometo ribelon de alt- kaj basvoĉa hundokolero, en kiu sin miksis baldaŭ la insultkriado de raŭka gorĝo kaj la paŝado de pezaj botoj. Kaj malfermiĝis la pordo kaj kraĉis renkonten al mi la tutan furiozon de vilaj, hirtaj, glataj, malhelaj kaj helaj kapoj, dorsoj, vostoj kaj piedoj, kaj estis ĉirkaŭ mi ekscititaj avidego, vidigo de la dentoj, bojaĉado kaj vostosvingado, kiuj povus ektimigi min, se mi ne estus estinta konata al la hundoj kaj parte eĉ amika. Kaj enmeze de la hundoribelularo, kiu sin premis apud kaj inter liaj longaj piedoj tra la pordo, aperis la atleta maljunulo, la pipon en la maldekstra buŝangulo, la maldekstran manon ĉe la pipokapo, dume la dekstra mano salutante sin levis al la eluzita feltoĉapelo sur la frunto kaj paro de ruzaj grizaj okuloj dekstre kaj maldekstre

kontraŭleĝa agado kun la celo de restarigo de la situacio antaŭ la 11. julio 1936.

Ankaŭ ĉi tiu tempo pasis.

La nova interkonsento estas farita kaj nia arda deziro estas, ke ĝi plenumu plene, kion ambaŭ partoj esperas de ĝi ... Aŭstrio ĉiam estis preta, respekti la en Germana Regno regantan ŝtatkoncepton kaj forpreni internpolitikajn aferojn el la politika diskutado en Aŭstrio ... ĉi tiu principo povas esti komplete efektivigota

kiom longe ne internpolitikaj agadoj kaj speciale kontraŭleĝa agado kontraŭ la aŭstria ŝtatkoncepto kaj -formado estas identigataj kun ilia sintenado al la germana ŝtatkonfeso" ...

... Je nia bedaŭro ni ne povis rebonigi ĉiun malfeliĉaĵon, kiun alportis la jaro 1934 kun siaj ekskuoj en februaro kaj julio. Ni aŭstrianoj perdis la viron de nia popolo, la kuraĝan vojpretiganton de nova epoko; ni perdis nian gvidanton Engelbert Dollfuß. Kiel precipe ĉe ribeloj, je kiuj ne estas demandata pri rajto aŭ malrajto, sed pri sukceso aŭ malsukceso, la hazardistoj ĉiupartiaj forlasis la landon. Restis tiuj, kiuj plej kredeme sekvinte sian idealon, estis pretaj, obei kun la armilo en la mano. Al ili estis pleje suferi la rigoron de la leĝoj.

Ni klinas en ĉi tiu horo niajn kapojn antaŭ ĉiuj viktimoj!

Kiu pro idealismo kaj ne pro profitemo, en la kredo fari sian devon, suriras la barikadojn, neniam estis la vera utiliganto de la revolucio; li tial havis, se la sorto restis al li favora, ĉe reveno de pli trankvilaj tagoj la rajton je repaciĝo. **Tio estas la senco de la amnestioj.** La decida ne estas, ĉu ĝi venas al la indulo, sed la fakto, ke la finstreko povis esti farita sub ĉio, kio estis ... Ni ĉiuj havas patrolandon. La patrolando ne povas vivi, se ĉiama malkonkordo subfosas ĝian fundamenton. La lando ne povas prosperi, se tro de ĝiaj filoj intencas malhelpi ĝian progreson. Sed al la popolo neniam povas esti beno, se lando kaj patrolando ĉiam denove ricevas novajn vundojn. Lando kaj popolo vivos, tiel aŭ tiel. Sed ni do volas, ĉiu por si mem, povi fari pli bonan ol la alia, esti **sociale ankoraŭ pli justaj, nacie ankoraŭ pli absolutaj, patriote ankoraŭ pli fidelaj kaj fidindaj.**

Tial: **Unuiĝu en Patriota Fronto,** kiu donas lokon al ĉiuj. Kiu intence deziras resti en la etapo, al tiu restas ankaŭ ĉi tiu vojo. Sed li poste ne plu povos plendi, ke li ne havas okazon al kunlaboro. Unu ni neniam kaj sub neniaj cirkonstancoj permesos: ke la **Fronto estos detruata de la Etapo.**

Ni nun donis pruvojn de bona volo kaj fido plenmezure.

Ni invitis la iamajn partiligitajn socialdemokratojn al kunlaboro en Patriota Fronto; ni malfermis al la iamaj partiligitaj nacisocialistoj kiel al la anoj de ĉiuj aliaj grupoj, sub tute egalaj kondiĉoj, la eblecon al kunlaboro. Tio ne estas nova.

La germana paco,

kiel mi deziras nomi la faritan interkonsenton, denove malfermas al tiuj, kiuj apartenas al la nacisocialista ideologio, la vojojn al kunlaboro kun ĉiuj aliaj, se ilia konfeso estas en sincera kaj klara kaj nedubesenca konsento kun la principoj de la konstitucio, kiu kreis laŭ la volo de Engelbert Dollfuss la sendependan kaj memstaran, germanan kaj kristanan, profesi-korporacie organizitan kaj aŭtoritate gvidatan Aŭstrion, krome estas en konsento kun la principoj de Patriota Fronto, krom kiu en Aŭstrio povas ekzisti neniu politika partio kaj neniu politika organizformo, en kiu por la egalrajto de ĉiuj je nešanĝebla persisto je iliaj principoj estas zorgata.

De regnogermana flanko

samtempe estis ripetata la certigo, decidige antaŭzorgi por la neenmiksiĝo en internpolitikajn aferojn de Aŭstrio, nome per tio, ke la regnoregistaro estas preta fari aranĝojn, kiuj malebligos emmiksiĝon de regnogermanaj instancoj en internaŭstriajn aferojn; estas interkonsentite kaj konstatite, ke la ĝisnuna kontraŭleĝularo en Aŭstrio neniel povas kalkuli je ŝirmo flanke de eksterŝtataj instancoj aŭ je tolero flanke de la aŭstria federacia registaro, kontraŭe ke ĉiu kontraŭleĝa agado devige estos punata laŭ la leĝoj.

... Honesta paco tiu estis, ĉar la principoj koncerne la fundamentojn de nia ŝtata surkonstruo restis senŝanĝitaj. Ni iris ĝis tiu limo, malantaŭ ĝi tute klare kaj unusence staras: **ĝis ĉi tien kaj ne pluen!"**

Kaj nun al la pure internaŭstria flanko de la demando! „.... Estas tempo forigi agitvortojn de pasinta epoko. **„Ne naciismo aŭ socialismo** en Aŭstrio, sed **patriotismo** estu nia signalvorto! Kaj kio estas sana en la diversaj pensoj kaj programoj, tio havos lokon en la unua nacia kaj sociala movado en nia patrolando, en Patriota Fronto!"

„... Kelkfoje ni renkontas en alilandaro legendajn ideojn ankaŭ pri ekonomiaj aferoj en Aŭstrio, kiuj nur povas veni el tendenca fonto. La banala bildo de ciferoj pri la evoluo montras, ke ni ne sukcesis fari miraklaĵojn, sed ke tre atentinda, solida kaj ĉiam pli larĝan spacon gajnanta ekonomia progreso estas atingita .... Nur kelkaj ciferoj: Plialtiĝis la eksporto depost 1933—1937 je 55½%; la indekso de produktado de 64 je 104; produktado de krudferaĵoj je 342%, de ŝtalo je 188%, de lamenajoj je 140%, de papero je 33%, de kartonoj je 200%, de kotonfadenoj je 200%, de petroleo 4000%, de tritiko je 1704, sekalo je 100%, terpomoj je 4304 kaj de sukero je 1100%. Federaciaj Fervojoj havis frekventaltiĝon de 22% kaj pli grandajn enspezojn je 16.5%. La malpliiĝo je senlaboruloj estas 100.000 personoj. La nombro de la fremduloj altiĝas de 1936 kompare al 1937 je 26%.

„Nia celo devas esti, atingi, ke plejeble ĉiu laborvola homo en la lando trovu laboron kaj speciale la 100.000 junuloj, kiuj ĉiujare alkreskas."

„... Sumo de 299 Milionoj da ŝilingoj estas destinita por publikaj laboroj. Al tio venas ankoraŭ aliaj aranĝoj, por servi al la laborhavigo en la lando ... Tiel en konstanta, celkonscia laboro estu certigata la ekonomia kondiĉo por la sukcesigo de la aŭstria verko ... La budĝeto, kiu estas sub la plena kontrolo de la publiko, estas en ekvilibro. La ŝuldoj en eksterlando malaltiĝis en la lastaj 5 jaroj de 4250 milionoj da ŝilingoj al 2000. La havaĵo de la monbiletbanko altiĝis en 1937 je oro kaj valutoj je 57 milionoj .... La demando pri la ekonomiaj eblecoj de Aŭstrio estas jesata; koncentracio kaj trankvilo en la lando helpas, malpaco kaj malhelpo malrapidigas la pro-

---

de barbare larĝa kaj stumpa nazo min afable alpalpebrumis. Tiu estis Tauchen kaj li en nenio estis ŝanĝiĝinta. Li estis ricevinta nek novan ĉapelon nek novan jakon, nek novan vizaĝon. Ĉio je li estis disfendita kaj disfalinta kaj kiel kovrata per krusto de praarba oksidaĵo kaj elsendis intensan miksaĵon de fortaj odoroj, sed ĉefe tamen tiun de restinta piposuko — nikotiana liquida exfumata.

Tauchen kutimis purigi sian pipon, kiu nur dum la dormado kaj dum la manĝado malaperis el lia buŝo, per plumoj, kiujn li post la uzado ne forĵetis, sed metis pro sekiĝo sur la ĉapelon, per kio ili plenumis la duoblan celon de utilo kaj ornamo.

Mi skuis al li la fortan, larĝan manon kaj antaŭ ĉio donis esprimon al mia miro pri tio, ne esti vidinta lin hodiaŭ en la preĝejo. Li gratis sin ruze ridetante malantaŭ la orelo kaj en la nekulturita, malpurgriza barbo kaj diris, ke li matene ne tute bone fartis, el kio mi deduktis, ke lia kutima sabatvesperebrio ĉi tiun fojon estis sufiĉe granda. Starante antaŭ la pordo — ĉar li neniam invitis, iri en la internon de lia ĉambraĉo — ni nun vaste priparolis la travintradon de la diversaj specoj de ĉasbestoj kaj kelkiujn aliajn forst- kaj ĉasdemandojn kaj decidis fine, renkonti unu la alian je la venonta mateno du horojn antaŭ tagiĝo ĉe la ŝosekruciĝo malantaŭ la arbarmuelejo kaj iri al la plej bona parigloko de la urogaloj.

Poste mi sur ĉirkaŭvojoj hejmeniris el arbaro kaj erikejo.

Mi havis malbonŝancon je ĉi tiu parigmateno, unu virurogalon mi ektimigis, unu mi ne trafis.

La maljuna Tauchen provis konsoli min per la filozofa rimarko, ke ĉe la pafado apude do estas pli multe da loko. Malbonhumore mi venis el la arbaro kaj apenaŭ mi ĝojis pri la belega mateno, kiu estis freŝa kiel infananimo kaj plena de alaŭdotrilado super la amata montara lando. Ankoraŭ mi esperis, superruzi unu el la multaj virurogaloj, kiuj dum la duona antaŭtagmezo super erikejo kaj kampoj logis la inojn, ke ilia akra kriado plenigas la tutan regionon.

Sed ĉi tiuj estas la plej ruzaj inter ĉiuj birdoj. Vi nur bezonas havi la ideon, ĉasaliri unu, li jam mutiĝas, faras longan kolon kaj flugetas for. La vaneloj min ĉagrenis, kiuj balancante sidis sur la muskoaltaĵoj en la marĉetoj kaj, kiam mi preterpasis, min kun siaj brilantaj flugiloj balancante ĉirkaŭflugetis kaj gorĝridis, kvazaŭ ili volis min moki.

Tiel, la fusilon sur la dorso svingante, la manojn malkontente boritajn en la poŝojn, mi venis, post kiam mi estis ĉe la vojkruciĝo adiaŭinta Tauchen, al la arbarmuelejo, kiu, impona konstruaĵo, situas flanke de la ŝoseo en de tri flankoj de la alta forsto ĉirkaŭmalheligata herbejkavaĵo ĉe la rivereto, kiel en trankvila golfo. La akvaro, kiu ĝin movas, estas la deflua el sude kaj kelkajn klaftojn pli alte en la arbaro situata lageto. La matensuno kuŝis plene sur la pura domo kun la alta ŝindotegmento, kies kamentubo ringe sendis gracilan fumon en la klaran aeron. La briletanta

greson. Sed kiu deziras malrapidigi la progreson estas malamiko speciale de la aŭstriaj laboristoj."

„Niaj rilatoj al ĉiuj ŝtatoj estas bonaj... Nia neskuebla volo al propra ŝtateco kaj sendependeco de nia aŭstria patrolando estas ekster ĉiu dubo. Nia lando ne nur estas historie kaj organe dum jarcenta leĝa evoluo estiĝinta fakto, ĝi estas ankaŭ fikspunkto sur la landkarto de Eŭropo kaj por la tuta kulturmondo koncepto, kiu ne plu estas forpensebla el la eŭropa ĝenerala bildo. Nia politiko devas esti tial taksata kiel real- sed ankaŭ kiel idealpolitiko en la servo de l' paco.

Unu en tiu ĉi kontakto estas sen dubo: La aŭstriano, kiu volas sian patrolandon libera kaj sendependa, pensas je tio ne al la packontrakto. Certe ne sekve de ĉi tiu tre tiutempa kontrakto ni postulas la rekonon die nia rajto. Decide restas la forta volo de la aŭstria popolo kaj la neŝanĝebla konvinko de ĝia respondeca gvidado, ke **nia Aŭstrio devas resti Aŭstrio!** Ni ne deziris la geografian bildon kaj ne kulpis pri ĝi, kiun la landkarto depost 1918 montras. Ni ne elektis niajn limojn, sed tion, kion ni posedas, tion ni volas konservi kaj konservos! Tiu vivu kaj vivos, ĉar ĝi povas servi ankaŭ tiel, kiel ĝi estas, al la propra popolo, al la germana kulturo kaj la germana sorto, al la mondo, al la spirito de l' paco.

Ni solene konfesas antaŭ la tuta mondo al nia patrujo. Ni estas kristana ŝtato, ni estas germana ŝtato, ni estas libera ŝtato kaj ĉiu en ĉi tiu lando estas egalrajta antaŭ la leĝo."

„...Unu validas por ĉiu aŭstriano: Ni ne plu pensu **laŭ partioj,** ni kontraŭe devas **nur pensi kiel homoj kaj aŭstrianoj.**

Politikan luktadon pro la potenco inter unuopaj grupoj mi per ĉiuj fortoj kontraŭagos, ĉar la lando bezonas trankvilon. La eblaj kaj necesaj platformoj por la pacaj diskutadoj kaj aranĝo de opinidiversaĵoj estas en la kadro de Patriota Fronto. Ĉiuj devas klopodi en la intereso de la patrolando konservi la socian pacon, la laborpacon. Necesas laborcertigo kaj laborhavigo. La penso al la alia, kiu bezonas helpon, ĉiam devas esti pli forta."

„Ni ne permesu, ke estiĝu denove klasfrontoj. Sed tion mi diras al vi nun: Se ankaŭ ĉi tiu alvoko ne helpus kaj se formiĝos iu fronto **„Jen laboristoj — jen inteligentuloj",**

tiam vi trovos min je la flanko de la laboristoj!"

„...Kiam la horo al decido venos, al solena konfeso kaj al montro de la unuigita volo, tiam Patriota Fronto, kiu hodiaŭ sen familianoj nombras **pli ol 3 milionojn** da aŭstrianoj, vin vokos, kaj vi venos! Mi fidas al vi!"

„Se oni min demandas: Ĉu vi kredas je la sukceso de via programo kaj kiujn garantiojn vi havas? Tiam mi respondos: Mi ne nur kredas, mi ĝin scias. Ĉar unue staras kiel muro la liberecvolo de la aŭstria popolo kaj la interna valoro de nia lando. Krome en decida horo ĉiam denove unuiĝis la bravuloj kaj kuraĝuloj kaj la dubemuloj kaj senkuraĝuloj malaperis. Ankaŭ mi estas plej profunde en la koro konvinkita, ke la memoro al Engelbert Dollfuss kaj ĉiuj martiroj de ĉi tiu lando protektas la fortojn de tiuj, kiuj nun portas la respondecon. Kaj ankaŭ mi fidas al Dio, kiu ne forlasos nin. Sed tiu ĉi fido supozas la scion, ke Dio nur helpas al tiuj, kiuj mem estas decidemaj uzante ĉiujn fortojn ĝis la ekstremo kaj al la kunigo de ilia tuta volo.

Kaj ĉar ni estas decidemaj al tio, tial la venko estas sen dubo.

Ĝis al la morto Ruĝ,blank-ruĝa (la koloroj de Aŭstrio. red.)! **Vivu Aŭstrio!"**

„Esperanto-Genève" skribas sub „Por memorigi": „...Kaj nun, ĉu iu ankoraŭ dubas pri la nova vojo, kiun iras la Aŭstria Ŝtato? Kaj la ekzemplo de E. en la Tria Regno ja sufiĉe indikas kien iros la movado en lando samdirektigita aŭ niveligita."

Ni nur deziras konstati la fakton, ne kontraŭparoli „Esperanto-n". Ni iris al la kompetenta oficiala instanco kaj petis la de ni en la afero publikigotan tekston. Jen: „Laŭ la interkonsento de Berchtesgaden kaj la direktivoj de kanceliero kaj gvidanto d-ro Schuschnigg Aŭstrio restos sendependa ŝtato, en kies internajn aferojn Germana Regno ne enmiksiĝos. Kiel d-ro Schuschnigg jám de komenco intencis, nun ĉiuj austrianoj havos la okazon kunlabori en la sola politika instanco „Patriota Fronto", kiu iros sur d-ro Dollfuss-vojo. Per tio la internaj luktadoj estu elŝaltotaj. Pri „samdirektigo aŭ niveligo" kun la dua germana ŝtato ne povas esti parolata."

30-a Universala Kongreso de E.

London, 30. julio ĝis 6. aŭgusto 1938.

Adreso: Sekretario de 30. Univ. Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Kotizoj: Ĝis 31. 3. 1938 Funto 1-5-0, poste 1-10-0. Edzo aŭ edzino de kongresano kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj pagos la duonon, plej bone en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj. En Aŭstrio vi pagu al la ĉefdelegito aŭ. ŝ. 33.—, resp. 39.50 kaj la ĉefdel. anoncos vian aliĝon al London.

Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos senpagan kongreskarton post aprobo de iliaj aliĝoj flanke de s-ro W. P. Merrick, kasisto de Blindula Ligo, Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

Aliĝiloj haveblaj ĉe Int. E.-Muzeo kaj la ĉefdel. de IEL en Aŭstrio, ankaŭ ĉe via landa organizo.

Donacoj volonte akceptotaj.

Glumarkoj: Belaj glumarkoj pri la kongreso haveblaj ĉe la ĉef- kaj la delegitoj. Uzu ilin, kiuj aspektas vere belaj. Prezo por 50 nur 2 int. resp. kup.

Loĝado. Kiel eble plej baldaŭ loĝmendiloj estos dissendataj.

Hoteloj: Lito kun ampleksa matenmanĝo 4½—14 angl. ŝ. Oni intencas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

Manĝoj: La ordinara prezo por lunĉo 1—3½, temanĝo 9 pencoj—2 ŝ; vespermanĝo 1½—5 ŝ.

Oficiala organo: Ĉiu kongresano ricevos la gazeton The BRITISH ESPERANTIST de januaro ĝis julio kaj poste la numeron, kiu enhavos la raporton pri la kongreso.

---

akvofalo je la transfluejo vaporis, kaj diligenta frapado penetris el la uzino, dume en la longa, ligna malantaŭkonstruaĵo kun la tabulsegilo la laboro ne ankoraŭ estis komencita.

La orienta parto de la valeto situis malhele kaj malvarmete sub la oblikvaj radiofaskoj de la suno. La longaj ombroj de la piceopintoj ŝoviĝis trans la prujnkovritan herbokovraĵon preskaŭ ĝis al la pura domo.

Mi deiris de la ŝoseo, por veni sur malantaŭ la muelejo ĉe la arbarrando kondukanta vojeto al la lageto, kies bordoj havas belajn lokojn, kiuj estas bonaj por ripozo kaj revado. Ĉirkaŭ la muelejo neniu estis videbla, nur aro de kokinoj bekpikis kaj grategis inter la amaso de la kunmetitaj traboj, kaj la virkoko staris fiere kikerikante sur derulinta trabo. Kiam mi surpaŝis la lignan ponton, kiu supre de la transfluejo kondukas super la fluakveto al la alia flanko de la valeto, mi vidis knabinon klinitan trans la balustradon, gracilan, preskaŭ ankoraŭ infanan figuron, pli bone ol laŭkamparane vestitan, sed sen ŝtrumpoj kaj ŝuoj sur la piedoj, kiuj nude elrigardis sub la mallonga jupeto. Du pezaj, malhelbrilantaj harplektaĵoj malsuprenpendis trans ŝiaj krucigitaj antaŭtukrubandoj. Kiam ŝi aŭdis min veni, ŝi turnis sin kaj rigardis, nun per la dorso apogante sin al la balustrado, la maldikajn brakojn etendante, trankvile ekzamenante al mi. La surprizo senvole haltigis mian paŝadon, tiel bela ŝi estis. Vizaĝo mallarĝa kaj pala kiel eburo kaj paro da okuloj tiel grandaj kaj tiel plenaj de malhela profundo, ke mi sentis kvazaŭ la tuta arbaro min alrigardis. La nazo rekta kaj ege delikate desegnita, la lipoj de l' senpasia velura palruĝo de la framboj, en la mezo fortaj kaj en graciajn anguletojn iomete larĝe disirantaj.

Mi sentis, ke la ruĝo venis en mian vizaĝon, kaj preterpaŝis, la rigardojn mallevante, sen saluto kaj rapide, kiel malfacile tio estis al mi. Je la fino de la ponto io tamen ankoraŭfoje retiris mian rigardon. Ŝi staris neŝanĝite, rigardis post mi, sed tuj mallevis la okulojn, kiam ili renkontis la miajn, kaj rigardis, rapide sin turnante, refoje malsupren en la akvon.

Dum mia vivo mi ne ankoraŭ estis tiel konfuzita. „Stultulo", mi pensis, dume mi malracie forkuris kiel ŝtelinto, preskaŭ maltrafis la ĝustan vojon al la lageto supre kaj mallerte pro lignosplito faletis. „Azeno", mi diris al mi, „kial ci ne almenaŭ estas dirinta al ŝi bonan matenon? Ŝi do tiun estis devinta respondi, kaj eble unu aŭ alia vorto estus parolita. Naivulo, stulta — fuŝulo — se ci havus — ja se ci nun havus virurogalon en la mano kaj hartufon sur la ĉapelo, tio certe farus impreson! Jen estus io por alrigardi — ŝi certe ne ankoraŭ estas vidinta urogalon en la proksimo — kaj la interrilato estus komencata, la konatiĝo farata."

Min tiel kulpigante mi apenaŭ rimarkis, ke mi ree estis en la arbaro. Mi haltis kaj rigardis malsupren. La ina figuro estis for. „Ĉu ci revis?" mi ekpensis. Kaj stulte mi fikse rigardis malsupren al la malplena ponto, al la brileganta rubando de la akvofluo kaj la akrebriletanta muelejo. Mi turniĝis, tute iris supren kaj nun vidis situi la trankvilan arbarlagon en la silente elstaranta rondo

Red. **Ervin Preis**, Budapest VII, Szövetség-utca 28 b, eldonis 10 seriojn de sigelmarkoj en 8 koloroj. Po 100 pecoj nur 3 poŝt-resp. kup., 1000 nur 25.

Vojaĝ-oficejo: La oficiala estas Cook. En Aŭstrio peras ĉiujn servojn Oesterr. Verkehrsbüro, Wien, I., Friedrichstraße 7.

Membraro. Ĝis la hodiaŭa dato pli ol 1000 personoj el 25 landoj.

Postkongresa rondvojaĝo en Skotlando okazos de 6.—12. aŭg. Informojn ĉe Cook.

Por la Organiza Komitato,
Cecil C. Goldsmith,
Sekretario.

INTERNACIA ESPERANTO-LIGO la centro de la Esperanto-movado en la mondo!

Ĉu vi estas membro?

Se ne, korektu ĉi tiun mankon kaj tuj fariĝu membro kun Heroldo aŭ kun jarlibro!

IEL bezonas **ĉiun unuopan samideanon** por helpi al la tutmonda movado!

Sed ankaŭ vi bezonas IEL, ĉar ĉefe pere de IEL progresoj estas eblaj!

Do **ankoraŭ hodiaŭ** aliĝu al IEL pere de via landa ĉefdelegito aŭ delegito!

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN.

Wien, I., Neue Burg (iama imperiestra kastelo), **Aŭstrio.**

Protektoro: Federacia Prezidanto de Aŭstrio s-ro Wilhelm MIKLAS.

Fondinto kaj direktoro: kortega konsilanto Hugo Steiner.

Fondita 1927, **inaŭgurita** 1929.

Memstara sekcio de Nacia Biblioteko (iama Kortega Biblioteko).

Novaj membroj:

L. A. Churchill, Derby, Anglujo.

Al demandoj ĉiam aldonu **respondkuponon!**

Por **Internacia Esperanto-Muzeo:**
Steiner, direktoro.

RADIO

Radio-Wien

11. marto „Ĉijaraj festaranĝoj en Aŭstrio".
8. aprilo „Aŭstriaj kasteloj".

Radio-Varna. (ondo 235.1 m): 5.3 „Esperanto kaj la naciaj lingvoj". 22.3. „Goethe kaj la muziko". Paroloj je 23 h 30—23 h 45 MET prof. **Dimov** el Varna.

Somerrestadejo en Aŭstrio — Melk ĉe Danubo.

Kiu ne aŭdis pri Wachau (elp. Vaĥaŭ), la belega valo de Danubo, jam fama el Nibelunga sageo. Ĉe la komenco de ĉi tiu plej bela parto de Danubo situas sur alta roko la plej bela barokabatejo en Aŭstrio, Melk kaj ĉirkaŭ ĝi la ĉarma loketo Melk.

Tie ni instalis ĉijare la aŭstrian somerrestadejon. En „Hotelo Bahnhof", tute proksime de la stacio mastrumas la delegito de IEL s-ano Ehrenreich. Li gastigos la s-anojn kaj vi pagos por plena pensiono **nur aŭstr. šil. 6.**— entute (ĉambro kaj 3 kompletaj, bone preparitaj kaj abundaj manĝoj), eĉ trinkmono enkalkulata.

Mendu ĝustatempe vian loĝejon ĉe Karl Ehrenreich, Hotel Bahnhof, Melk a. d. Donau, Aŭstrio.

Esperanto-Varbadservo por Aŭstrio.
Wien, I., Neue Burg.

FOIROJ

Viena Foiro
okazos 13.—19. marto 1938. Ĝi eldonis belaspektajn E.-varbilojn.

Foiro en Budapest: (29. 4.—9. V.) Belaj E.-glumarkoj.

Foiro en Lyon (12.—22. III.) Belaj grandaj E.-afiŝoj.

Festsemajnoj en Wien
okazos de 1.—19. de junio kun speciale riĉa programo, pri kiu ni ankoraŭ raportos.

Esperanto en la lernejo.

En **Desvres,** Francujo, Esperanto de nun estas instruata en la supera lernejo kun aprobo de la lerneja inspektoro. Instruas la direktoro de la lernejo s-ro A. Dumarquez.

En **Bydgoszcz,** Polujo, en la klasika gimnazio partoprenas E.-kurson 63 gimnazianoj kaj 1 profesoro de la franca lingvo.

En **Colchester,** Anglujo, f-ino Effie Walters, instruistino, konvinkis la lernejestron pri Esp. kaj instruas ĝin en 2 klasoj, kie la gelernantoj ne sukcesis lerni la francan lingvon. La lernejestro promesis baldaŭ enkonduki E-on ankaŭ en la programon de la ceteraj klasoj anstataŭ la franca lingvo.

---

de la forstoj, kies multfoje pintita suprorando supren rigardas el la marĉa akvo kiel el nigra spegulo. Mi venis al la kluzo, kie la akvoj kun malbrua gargarado estas tirataj en la elfluejon. La akvo ĉi tie estas speciale profunda kaj en sia malhelo klara kiel nigra diamanto. Ĉe la bordorando brunete ĝi travidiĝas kaj staras poste vitrohela super aro de palaj, senkoloraj ŝtonoj. „Tiaj estas ŝiaj okuloj", mi pensis, staris kaj revis malsupren kaj pluen iris al loko, kie neniu arbo staras kaj la bordo finiĝas en kurbo ebene kaj malprofunde, tiel ke multaj el la blankaj ŝtonoj seke rigardas el la akvo. De tie estas la plej bela rigardo trans la lagon. Mi kuŝigis min en la sekan herbon kaj vidis la vastan, malhelan ringon de la altarbaro. „Tiaj estas ŝiaj okuloj", io parolis en mi. Mi derompis malgrandajn branĉojn, disfoliumis abiofrukton kaj ekhavis gluajn fingrojn. Sur mallarĝa terlango, kiu herbokovrita ŝoviĝas en la lageton, elvenis kapreolo, ĉirkaŭrigardis, sin klinis gracile al la trinkloko kaj ree rigardis ĉi-transen. „Tiaj estas ŝiaj okuloj", mi pensis kaj eksidis. La kapreolo faris kelkajn saltojn kaj timigite malaperis en la arbaro. Mi leviĝis, staris tempospacon kun krucigitaj brakoj, faris kelkajn paŝojn malsupren al la akvo kaj tute enpense levis platan ŝtonon, kiun mi per forta ĵeto glitigis sur la akvo. Ĝi glitis distancon laŭlonge de la bordo kaj falis brue en la kanejon, el kiu flugetante kaj kvakante anasoparo leviĝis, pri kio mi forte ektimis kaj retrovis al mi. Nun mi rimarkis, dume mi plupaŝis, ke multaj birdoj kantis.

Merlo super mia kapo flutkantis speciale dolĉe. Mi fariĝis melankolia kaj forte ĝemis, poste mi ŝovis mian fusilon per forta ekpuŝo malantaŭen kaj komencis mian hejmvojon.

Baldaŭ post la manĝo mi adiaŭis min de la gepatroj, por, kiel mi diris, ree provi ĉasi virtetrojn, kiuj kontraŭ vespero ree vageflugas el la arbaroj al la pariglokoj.

Io min tiris forte al la muelejo, sed speco de neklarigebla timo agis kontraŭe, tiel, ke mi fine ekiris la kontraŭen direkton kaj celis al iom pli alte situita erikeja altaĵo en la oriento. Tie situas malgranda vilaĝo, nomita Bernschlag, nur kelkaj dislokitaj kabanoj, kiuj apartenis al la plej mizeraj kaj antikvaj en la regiono. Ĉe la frontonoj ili havas, kiel la domoj en erikejo de Lüneburg, skulptitajn ĉevalkapojn.

Se oni troviĝas sur la plej alta loko de la erikejo, staras en la sudo super la longetendiĝanta nigra arbarrando la plej altaj suproj de la foraj Alpoj senpere kaj nekontinue en vastaj distancoj. Malofte stranga aspekto.

Mi serĉis ĉe arbaranguleto loketon kun bela superrigardo, etendis mian mantelon kaj kuŝis min sur la ventron, la fusilon pafpreta antaŭ mi.

Ankoraŭ staris la suno alte kaj kiel palarĝenta tabulo malantaŭ maldensaj blankaj nubostrioj. La objektoj jetis necertajn delikatajn ombrojn, kiuj kelkfoje malaperis kaj poste nerimarkeble reestis. La aero estis milda kaj laca, nenio moviĝas en la duonlumo de l' arbaro kaj super la ruĝeta helo de la erikejo. Eĉ la birdoj estis malviglaj. Unu el tiuj mildaj tagoj, kiel ili ofte estas ĉirkaŭ Pasko.

Hugo Steiner 60-jara.

Nia kara samideano kortega konsilisto Hugo Steiner, ĉefinspektoro de Federaciaj Fervojoj en pensio, finis la 26. de februaro sian 60-an vivojaron. Al liaj meritoj pri nia movado de pli kompetentaj esperantistoj estos donata la inda loko en la historio de Esperanto.

La de la jubileanto en 1924 fondita kaj eldonata gazeto Aŭstria Esperantisto donas per la regula apero kaj la konstante pligrandiĝanta evoluo de la enhavo kaj de la ekipo la plej bonan pruvon pri la senlaca kaj sukcesplena agado de Steiner sur la kampo de Esperanto. Lia fondaĵo, Internacia Esperanto-Muzeo en Wien, en 1927, kies aligon al la fama Aŭstria Nacia Biblioteko kaj kies starigon en la historia konstruaĵo de Neue Burg sur unu el la plej belaj kaj interesaj placoj en la mondo li akirluktadis, lia preparo de la en la Viena Parlamento en 1934 okazinta Internacia Konferenco kaj la aranĝo de 28. Universala Kongreso de Esperanto en Viena Hofburg (imperiestra kastelo) kun la grandioza aŭtobusveturado tra Aŭstrio meritas esti notitaj kiel mejloŝtonoj en la Esperanto-movado. Ankaŭ la diplomata, energia kaj sukcesplena interveno de St. por la bezonaĵoj de E. ĉe registaro kaj oficialaj instancoj en Aŭstrio estas modelaj por gvidanto de nia afero.

La multnombraj Radio-paroladoj, kiujn St. faris el Radio-Wien kaj el multaj alilandaj radio-stacioj en la intereso de Esp. kaj de sia hejmlando Aŭstrio, liaj konstantaj lingvokursoj en Radio, en la rondoj de la organizo kaj en Viena Policlernejo, lia bona lernolibro „Ĝojo per Esperanto", lia lasta agado per eldonado de en ĉiuj medioj de nia movado jam delonge sopirata Tutmonda Adresaro kaj lia agado kaj helpo en ĉiuj aktualaj demandoj pri disvastigo kaj organizado de nia Esperanto estas meritoj, kiuj kunkaŭzis, ke alvenis al la jubileanto alskribajoj de esperantistoj el tutmondo, sed ankaŭ flanke de altaj funkciuloj publikaj, inter ili de la fama favoranto de la E.-movado en Aŭstrio prezidanto de Federaciaj Fervojoj iama ministro Fritz Stockinger.

Viena E.-Klubo, kies fondinto kaj ĉiama prezidanto St. estas, povas esti rigardata kiel modelo en nia movado. Estas vera ĝojo observi, kiel harmonie okazas la kunveno; en ĉi tiu rondo, vera familia rondo, kaj kiel serioze kaj samtempe gaje la pliperfektigo de la lingvo kaj la sento por la idealoj tie estas kulturataj.

La kortuŝa festaranĝo por la jubileanto en la Klubo, je kiu anstataŭante la malsanetan vicprezidanton kortegan kons. Bastl la sekretario s-ino Hojtasch faris la gratulparoladon, dum kiu f-ino Kassner transdonis florojn, s-ano Weber bele desegnitan diplomon kaj poemon kaj s-ano Falbyczuk pentritan memoraĵon, estis signo de la granda simpatio, kiun ĝuas la jubileanto.

Al la verkinto de ĉi tiuj linioj kort. kons. Steiner preskaŭ dum 35 jaroj estas konata el la dejorado ĉe la fervojo kaj li sentas kiel kordeziron, gratuli St., kiu varbis lin antaŭ 3 jaroj por E. D-ro Max Höfer.

*

Al sesdeka datreveno
De l' naskiĝotago Via,
Korgratulas kun sereno
Nun la societo nia.

Ankaŭ estu kora danko
Por laboro dumlongjare,
Malgraŭ nia ofta manko
Vi gvidis ĉion senerare.

Se Vin dum batal' kuraĝa
Hipokrita sago trafis,
Restis ĉiam Vi junaĝa
Kaj bonege reen pafis.

Ni deziras, pacifisto:
Vivu longe, Vi en gloro
Ho kortega konsilisto
Pro la vere verda koro.

Edwardo W e b e r.

Koran dankon al la multaj organizoj kaj s-anoj kaj la neesperantistoj, kiuj afable gratulis min. Krome mi dankas al la gazetoj: „Reichspost", „Volks-Zeitung", „Neues Wiener Tagblatt", „Kleines Volksblatt", „Kleines Blatt", „Echo", „Korneuburger Gemeindewoche" kaj „Heroldo de Esperanto" unuavice pro la belaj artikoloj. S t e i n e r.

Tutmonda Adresaro 1938

havebla kontraŭ pago de 2 angl. ŝil. aŭ 4 int. poŝt. — resp. kup.

Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154, Aŭstrio
(Leteroj ankaŭ: Wien, I., Neue Burg)

Pri **Adresaro en ne-Esperanto-gazetoj**: **„Al-Mokattam"**-Cairo (8. 1.), **„Karun"**-Cairo, gazeto **„Fayum", „Bahr Jusef"** (ĉiuj Egiptaj, flanke de s-ano Mahrus, Fayum). — **„Le Moniteur"**, Louvain, Belgujo en n-ro 5 longa artikolo pri Tutmonda Adresaro kaj en 7 pri Eldiro de Otto de Aŭstrio pri Esperanto (aranĝis Maurice Wauters, del. IEL, Louvain). — En gazeto **„Der Unterländer"**-Hagenau (Franc.) 7. 2. 38 de prof. Kiehl.

El Bulgarujo.

En Osmar, kiu estas vinbera centro de la plej bongusta deserta vinbero „Osmara", speco, kiun oni forsendas al Wien, Berlin, London, inter la tieaj viglaj vilaĝanoj estas 30—40 dezirantaj E.-kurson. — En Ŝumen mi malfermis E.-kurson, kiun gvidas la sekr. de nia klubo Stalijan Daniskor, agronomo. 30 personoj partoprenas. Je Zamenhofnaskiĝtago ni aranĝis feston kaj faris paroladon. La 28. januaro estis la 33-a datreveno de l' fondiĝo de nia grupo „Vekiĝo". La du gazetoj ĉiutagaj „Zarja" kaj „Nova Kambana" en Sofia ĉiun semajnon je fiksita tago aperigas Esperanto-paĝon. Intereso plivigliĝas al Esp., tamen mankas vera konscio de l' signifo de E. ĉe registaro kaj aliaj kulturfaktoroj, verkistoj. Estas multaj esperantistoj, sed dissemitaj tra la tuta lando kaj tial ne povas prezenti fortan efikon.

Fine ankoraŭ unufoje gratulon pro via Adresaro, kiu estas granda, grava dono al la tutmonda esperantistaro.

Ilija Silvestriev, del. IEL, prez. de Vekiĝo.

El Ĉinujo.

Helpu tutmonda esperantistaro. La E-movado en Ŝanhajo nuntempe estas en malbona situacio. Ĝin funkciigas ne-facile iuj fervoraj s-anoj. Subtenu ilin per alsendo de uzitaj poŝtmarkoj.

S-ro Ĉoĉa, 14/169 Carter Rd., Ŝanhajo, Ĉinio.

Ili solvas la animon en moleco kaj revado. La granda silento naskas mistifikojn de l' aŭdsento. Ofte oni opinias aŭdi forajn sonorilojn. Kiu estas en la fremdlando, sopiras al la hejmlando, kiu estas en la hejmlando, al la malproksimo, al Italujo aŭ al revolandoj, kiuj nur ekzistas sur antikvaj bildoj.

La unuan fojon en mia vivo mi sentis la grandegan solecon de la hejmlando, kiu estas por mi patrino kaj amikino jam de junaĝo, samkiel ion pezan sur mi. Mi fariĝis maltrankvila, la sango perdis en miaj venoj. Mi deziris havi ĉi tie amikon, kun kiu mi povus babili.

Kamparano plugis senjake en kelka distanco per malgrandaj, malgrasaj bovinoj sian mizeran kampon, kiu etendiĝis en neregula cirklo ĉirkaŭ obstina granitbloko. Tiu ĉi kuŝis tie peze kaj necedeme kvazaŭ ĝi volis diri: „Plugu nur, min ci ne forigos." Unue, kiam mi estis ekvidanta la viron, mi koleriĝis, ke li forpelos la virbirdojn. Nun mi havis preskaŭ emon, iri al li kaj lin alparoli. Certe ne multo estas ellogebla el ĉi tiuj malhelaj, altkreskintaj homoj kun la suspekta rigardo. Ili luktadas grave kun la malabunda naturo pro sia pano, luktas kun rokopecegoj kaj marĉo kaj la longa, malmilda vintro. Ili facile ekscitiĝas, sed kaŝas sian koleron, tiam ĝi longe daŭras. Kaj la brando — ĉar biero kaj vino estas tie ĉi supre tre multekostaj — tiras de ili poste en la gastejo eble unufoje senintence la tranĉilon el la poŝo.

Mi denove estis tro neagema por ekstari. Mia animo ĉirkaŭflugetis senripoze kiel birdo, kiu serĉas lokon por sia nesto. Mi deziris multon kaj tamen nenion konkretan. Kaj subite flustris mia animo: „Ŝiaj okuloj ... ŝiaj arbarokuloj. Kiun ili alrigardis, tiu ne plu forgesas tion. Kiun ili alrigardas, ties animo fariĝas silenta kaj vasta kiel la arbarlago, en kiu la arbojn speguliĝas tiel nigre kaj la nuboj tiel pale kaj en kiu la ĉielbluo fariĝas bruna kaj ĉio kiel trempita en melankolio ...

Ŝiaj lipoj ŝvelas palruĝe kaj velure kiel la framboj. Kaj kiam ili estas malseketaj, ili estos sangoruĝaj kiel dispremitaj framboj. Kaj dolcaj ..."

Tiel flustris mia animo kaj mi aŭskultis ĝin kun retenita spiro.

La suno subite sidis kiel granda, ruĝa nebulaĵtabulo sur la arbarpintoj en sudokcidento, kiuj ĉiam pli profunde sin boris en la ardon kaj ŝajnis bruli.

Kaj en la oriento transe supreniĝis preskaŭ je la sama tempo la luno, unue kiel fajrorebrilo, poste kiel kolosa, betokolora globo, sur kiu estas desegnita grimaca vizaĝo, groteska, ke oni ŝatus ridi.

Mi surŝultrigis fusilon kaj mantelon kaj iris hejmen.

Fino sekvos.

•

Kun permeso de Bermann-Fischer-Verlag, Wien, III., Esteplatz 5.

En la sama eldonejo eldoniĝis de la sama aŭtoro la romano **„La flava masko"** kaj en la skribaĵkolekto „Elrigardoj (Ausblicke)" la stilverkaĵoj **„Renesanco de l' humaneco"**.

La institucioj por la bonfarto de la Vienanoj.

Mallonga skizo pri la agado dum 3-jara urbestreco de iama vickanceliero Richard Schmitz.

Sur ĉi tiu kampo Wien ĉiam en la mondo havis gvidan rolon, jam tradician.

Kiam imperiestrino Maria Theresia ordonis, ke la instancoj serĉu la kaŭzon pri la mizero kaj alvokis la civitanaron al kunhelpo kontraŭ la mizero, la unua fundamento de laŭorda publika prizorgo estis farita. De tiu tempo ĉiuj urbestroj klopodis krei instituciojn, kiuj servu al la helpo por la malriĉuloj, malsanuloj, infanoj. Sub urbestro d-ro Lueger la malriĉaj maljuntraktas la demandojn pri ŝirmo de la familio. Ĝi enhavas la aferojn de loĝantarpolitiko kaj eŭgeniko, la prizorgon de infanriĉaj familioj. Famili-rifuĝejoj servas al familioj, kiuj estas sen loĝejo. En la servon de rekonstruo de edzecoj kaj familioj venis la nova instanco por edzeckonsilado; al la zorgo por patrino kaj infano servas la konsilado pri gravedeco. La iama instanco por edzeckonsilado estis aliigita kaj nun en intima kontakto kun „Josefswerk" kaj „Patrinhelpverko" de Patriota Fronto. En ĉi tiu kadro estis ankaŭ instalata Repaciginstanco por endanĝerigitaj edziĝoj kaj Edziĝpreparinstanco por al edziĝo pretaj gejunuloj sur religia fundamento. La nombro de la konsilinstancoj por gravedulinoj estas plialtigita je 16. ktp. ktp.

Por la gejunulprizorgado zorgas du grandaj verkoj: „Gejunuloj en mizero", kiu celas kolekti, speciale dum la vintro, senlaborajn gejunulojn en taghejmoj kaj doni al ili laŭcelan laboron, kaj „Gejunuloj en laboro".

9000 lernejinfanoj ricevas varman tagmanĝon kaj en la 101 urbaj infangardejoj estas 5000 infanoj, el kiuj 3500 ricevas la manĝon. En 1935 estis 33.000 infanoj, kiuj travivis feriojn en hejmoj sur la kamparo aŭ en tagrefreŝiĝejoj.

„Viena Gejunuloficejo" havas pli ol 65.000 protektatoj. Tio nur estu malgranda eltrančo el la granda verko de urbo Wien sub la urbestro Schmitz.

Infangardejo en Sandleiten domegaro

Dentkliniko en lernejo, Weimarerstraße

uloj ricevis en Lainz belegan kaj grandstilan hejmon, grandioza, granddimensia malsanulejo estis konstruita, Kuracejo por frenezuloj en Steinhof, Centra Infanprizorgejo kaj Orfanejo sur Hohe Warte estis kreitaj. — Sub d-ro Weisskirchner la Junulprizorgaferoj estis plilarĝigitaj. — Post la terura milito, post kiam Wien fariĝis kapitalo de malgranda ŝtato, ĉi tiuj instalaĵoj travivis malbonan tempon. Antaŭe ankaŭ la bonhavaj civitanoj faris multajn bonfaraĵojn kaj kreis fondaĵojn. Sed tiuj nun mem mizeriĝis kaj la urbo sub socialdemokrata estraro plikonstruis la prizorgon por saneco, enkondukis kuracistan servon en la lernejojn kaj lernejdentklinikojn, philarĝigis la luktadon kontraŭ la tuberkulozo kaj instalis en la novaj konstruaĵoj infan- gardejojn, ludejojn kaj banejojn. Ĉi tiuj faroj certe estis grandiozaj, sed ili ne nur servis al bonfaro sed al la politiko de la reganta partio. Tial la programo estis direktata laŭ la materia flanko. Religiaj kaj patriotaj konsideroj ne estis ŝatataj. Sed tio estis la plej granda eraro de la socialista epoko, en kiu oni ĉerpis la rimedojn por ĉi tiuj bonfaroj el la premantaj impostpagoj. La nova epoko depost 1934 estas malriĉa. Sed la mizero minacis multajn infanriĉajn familiojn, naskiĝmalpliiĝo, edzecruiniĝoj ktp. minacis la fundamentojn de la sociala vivo, tial la nova tempo devis unuavice klopodi renovigi ĉi tiujn fundamentojn, zorgi pri edzeco kaj familio. Kaj ĉi tiun taskon kune kun la konservado kaj plukonstruo de la ĝisnunaj instalaĵoj plenumi, estis la laboro kaj la fiero de la nuna urbestro Schmitz.

Unue li kreis apartan oficejon, kiu transprenis ĉiujn tiujn taskojn. Instanco pri-

Dentkliniko en lernejo, Heiligenstädterhof

Jakob Rosenberg †

Jakob Rosenberg, la konata estona Esperanto-pioniro, nur 56-jara mortis en Tallinn. Esperantisto de 1905 li multe propagandis kaj laboris en organiza kampo antaŭ la milito, kunfondis „Estona Stelo" kaj post la milito ĝis 1935 verkis aron da libretoj. Mi persone havis la feliĉon konatiĝi kun ĉi tiu ĉiam afabla kaj helpopreta homo dum mia prelegvojaĝo en 1932. Esperanto kaj speciale en Estonio multe dankas al la kara mortinto kaj ni ne volas forgesi lin. Steiner.

DIKTATORECO

Longjara sperto pri komitata laboro en la neŭtrala movado konvinkis min pri la alta valoro de la diktatoreco.

Mi ofte aŭdis dekon da inteligentaj homoj kune fari decidon tiom absurdan, ke neniu el ili sola farus ĝin.

K. R. C. Sturmer

(el Notlibro de Praktika Esperantisto)

ESPERANTO-EKSPOZICIO

okazos en Salzburg dum tempo de **Salzburgaj Festludoj** (aŭgusto 1938). Bonvolu sendi specimenajn esperantaĵojn al **Franz Fötinger**, instruisto, Salzburg, Kaserngasse 5 ,Aŭstrio.

E-grupoj de AEA kaj AEF, Salzburg.

Nova „Zamenhofstrato".

Originala raporto.

En **Porto Alegre**, Brazilio, okaze de la Jubileo „Rua Zamenhof" estas inaŭgurita. Mi ĝojas, ke mi sukcesis aranĝi tion.

Benjamin C. Camozato, prez. de „Sud-Brazila Esperantistigilo", Porto Alegre.

Polico. En la itala urbo Genova estas multaj policistoj, kiuj parolas Esperanton kaj dejoras kun la E.-insigno sur la maldekstra brako. (Nia Voĉo.)

Polico kaj Esp. Laŭ „Monata Polica Bulteno", Rotterdam, nun 300 policistoj lernas en Nederlando Esp-on.

La kvar sezonoj en Italujo.

Ĉu vi jam vidis tiun ĉi unuike belan gvidilon tra Italujo, eldonitan de Ŝtataj Fervojoj? Ĝi enhavas sur 32 paĝoj belegajn bildojn kun E.-teksto kaj krome 4 multkolorajn bildojn de famaj italaj pentrajoj el la plej famaj italaj galerioj. Mendu ĉe ENIT. Roma. Aŭstrianoj ricevas po 2 kontraŭ alsendo de la afrankokostoj de 20 g de E.-Muzeo en Wien, I. Neue Burg.

Fondo de nederland-hinduja lernejo en Aŭstrio.

En la ĉarma kuracloko Seefeld en Tirol, kiu jam delonge pro la dum vintro kaj somero same sana altmontarklimato posedas multnombran nederlandan kaj nederland-hindujan kolonion, en aŭgusto nunjara estos inaŭgurata lernejo, kiu servu por la infanoj el ĉi tiu kolonio kaj speciale al tiuj, kies gepatroj venis el Nederl. Hindujo por ferii en Eŭropo.

La lernejo estos sub Instruministerio de Nederlando, nederlandaj instruistoj instruos, nur la sportajn fakojn, speciale skikuradon, instruos aŭstrianoj.

Propra domo de E.-grupo.

Originala raporto de J. Shuttleworth.

E.-grupo en Burnley, Anglujo, kun tiam 60 membroj, aĉetis propran domon, kiu havas supre ĉambregon por koncertoj ktp., malsupre 3 ĉambrojn. La prezo estis tiam 300 anglaj funtoj. De tiu tempo ni pagis proksimume la duonan sumon. Tamen nuntempe pro la ekonomia premo niaj anoj estas same trafataj. Ni nun devas mem purigi kaj reparigi la domon kaj tio estas peza laboro post la taglaboro. Pro malgranda nombro de anoj (nur 30) la samaj personoj devas fari preskaŭ ĉion. Por enigi la necesan monon la sama malgranda nombro devas organizi aferojn, mem ludi diversajn rolojn kaj pagi. Ĉion por nia idealo Esperanto.

El Napoli.

Orig. raporto.

La E.-kursoj en lernejo Angiulli kaj ĉe la grupo progresas. La reganto de Napola Katedro d-ro Koch komencis kurson kun 20 albanaj lernantoj en la Instituto „Italujo". — Ĝoje akceptita estis la vizito de la diligenta propagandisto W. G. Werner el Dresden, kiu veninte el Anglujo vizitas la plej grandajn urbojn en Italujo.

D-ro Koch.

EL LA LEGANTARO

Espero Katolika. Aŭstria Esperantisto donas opinion de Otto de Aŭstrio pri Esperanto kaj bildon de Dollfuß, informojn el Aŭstrio kaj el la mondo. Kiel ĉiam leginda organo!

„. . . La interesa Adresaro, kiu de nun estos reeldonota ĉiujare la 15. dec., promesas de jaro al jaro fariĝi ankoraŭ pli ampleksa kaj kompleta . . . ‚La Folio', Malmö."

„Mi ricevis kun multa plezuro la utilan Tutmonda-Adresaro-n. Mi gratulas vin pro via senĉesa k. efika klopodo profite al Esperanto-Muzeo en Wien. Antaŭen! **G. Viana**, Bahia, Brazilo."

„Tre ĝojigas min Tutmonda Adresaro, kiun kun plezuro mi trarigardis, kaj mi tuj mendas kaj pagas TAE 1939. **Erik Pedersen**, Jyderup."

„Mi deziras senprokraste mendi la 1939-a eldonon, por kuraĝigi viajn laborojn. Kaj jen mi mendas du sinsekvajn eldonojn 1939 kaj 1940 kaj aldonas la monon. Nun mi povas trankvile dormi, mi ne forgesos sendi la aliĝon. **James F. Morton**, Paterson, USA."

„La Adresaro, laŭ mia opinio, estas treege valora verko-eldonaĵo. **K. Vidikauskas**, Philadelphia, USA."

Angla E.-ŝlosilo estas bona helpilo al Kongrespartoprenantoj. LKK sendis al ni kelkajn kaj ili estas haveblaj de ni kontraŭ pago de 20 groŝoj.

Al la aŭstriaj samideanoj!

Bedaŭrinde ekzistas ĉiam homoj, kiuj ne pripensas, kion la diversaj faktoroj en nia movado faras kaj intencas, sed nur malamike kritikas. Certe ankaŭ la menciitaj faktoroj en nia movado scias, kial ili ion entreprenas. — Ekzemple Verbadservo por Aŭstrio disponigas kontraŭ alsendo de la forsendkostoj kvanton de „Kvar sezonoj en Italujo", belega libro. Kial EVS tion faras? Ne por fari propagandon por Italujo en **alilandaro**, sed nur 1) por doni al la aŭstria esperantistoj belegan E.libron kaj 2) por disdoni ĝin al neesperantistoj en Aŭstrio, por montri al ili kion faras Italujo sur la kampo de Esperanto. — Por la forsendo al **alilandaro** kaj tiamaniere al varbado por **Aŭstrio** servas la E-gvidiloj, kiuj eldoniĝas de Foiro, Fremdulfrekventoficejo de Urbo Wien kaj Varbadservo de Ministerio por Komerco! **Tiujn forsendu alilanden!** Ili estas kaj estos riceveblaj kontraŭ alsendo de la afranko aŭ povas esti akceptataj ĉe E.-Varbadservo por Aŭstrio, Wien, I., Neue Burg. — **Do ne tuj kritiku! Pripensu kaj ĉiam unue pensu, ke ni klopodas dum jaroj labori por Aŭstrio kaj Esperanto!**

RECENZOJ

Esperantista Kalendaro 1938

eldonita de E-Asocio de Estonio, Tallinn, postkaast 6, 24 paĝa, enhavas la E.-grupojn de Estonio, la internaciajn organizojn UEA kaj IEL, la landajn, internaciajn E-gazetojn kaj estonajn E.-eldonaĵojn. Prezo ne montrita.

En propra eldonejo.

„La vivo de sankta Hônen" verkita de Isil-Mamine, prof. de urba komerca kolegio de Yokohama, trad. Nisida-Ryôya. — 77 pĝ. kun 31 pĝ. da detalaj notoj pri propraj nomoj kaj budhismaj terminoj. Kartonita 13 je 19 cm. 5 resp. kup. de la tradukinto s-ro Nisida-Ryoya, Saihôzi, Gokenyamati 302, Kiswada-si, Japanujo.

The Esperanto Publishing Co, London

„La vivo kaj koncepto de la societo de amikoj", kompilis The Friends Service Council, 64 pĝ., 13 je 18 cm, 1 ŝ, afranko 2 p, 1937.

La Societo de Amikoj (Kvakeroj) estas religia sekto, kiu faras multan bonon al la homoj sen konsidero de religio, raso kaj nacio, kaj la ĉapitroj en la libro estas plejparte verkitaj de ili. Tial ĝi estas pia libro. Memoru la nomojn de George Fox kaj William Penn.

Muusses Esp.-Biblioteko, Purmerend, Ned.

Ĉiu serio nombras **10 volumetojn** de 32—36 pĝ. en formato de 13 je 20 cm. Unuopa volumeto kostas o. 35 guld., la tuta serio 2.50 guld. afrankite.

N-ro 11. **„La ora jubileo de Esperanto 1937"**, Paroladoj, faritaj okaze de la 29-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, 7-a—15-a de aŭgusto 1937. — Aranĝis kaj kompilis Julius Glück.

El la subtitolo oni sciiĝas ja pri kio temas. Kompreneble ne ĉiuj paroladoj trovis lokon en la libreto, sed la elekto estis bona. Atentu kaj juĝu mem!

Parolado de L. Bastien, prez. de IEL, ĉe la tombo de d-ro Zamenhof; de Varma Thilander ĉe la tombo en versoj; de Julius Glück ĉe la tombo de Antoni Grabowski; de Varma Thilander en la interkonatiĝa vespero de la blindulkongreso (Versaĵo); de Julius Glück „Zamenhof kiel scienculo kaj filozofo"; de Paul Nylén, vicprezidinto de la Akademio, dum la ferma kunsido. Aldonita estas artikolo de d-ro Zamenhof „Pri la Kongreso" (1905).

N-ro 12: **„Nordnordaj fabeloj"** de Joel Thézard, ilustr. per kvin desegnoj de la aŭtoro.

La scenejo estas jam laŭ la titolo en la nordo, en la plej alta nordo. La fabeloj estas belaj kaj lerte verkitaj. La verkisto, juna esperantisto (de 4 jaroj) esperigas, ke ni povas atendi de li ankoraŭ aliajn interesajn verketojn.

N-ro 13: **„En la vagono kaj aliaj rakontoj"** de Ivan Sirjaev.

Malnova esperantisto de 1895, senlaca pioniro kaj iniciinto de Enciklopedio de Esperanto estis ĉi tiu rusa pastro, la verkinto.

Estas vere ĝojige, ke la eldonejo decidis honori la memoron al li per publikigo de iom el lia postlasaĵo.

En la rakontoj de Sirjaev respeguliĝas la rusa homo kaj la granda Rusujo.

Esperanto Publishing Co., Heronsgate.

„La princo kaj Betty" de P. G. Wodehouse, trad. de G. Badash el la angla. N-ro 3 de la „EPOKA" Libro-Klubo, 192 pĝ. Prezo por membroj de Libro-Klubo 1 angla ŝ plus afranko; por nemembroj 2.

Oni povas aliĝi al Libro-Klubo ĉe via librovendejo aŭ ĉe Libroservo de Intern. Esp.-Ligo, Heronsgate, Rickmansworth (Herts), Anglujo.

Anoncoj.

Anglujo. Monk, Dennis, 18-jara, 90 Essex Rd, Birkdale, Southport, Lancs., dez. koresp. kun samaĝaj fraŭlinoj.

Aŭstrio. Kurt Thoma, Amstetten, Wörthstraße 10, des. kor. per il. pk. kun tutmondo.

Vöcklabruck, Aŭstrio. F-ino Brünne Fohler, Gmundnerstraße 43, deziras koresp. k. tutmondo pri ĉiuj temoj. Certe respondas.

Nederlando. S-ro K. van der Schulp, Joss. de Jongstr. 3, Dordrecht, dez. kor.

USSR. Hmelevskij Georges, **Voronej**, ul. Pustovalovskaja 6 kv. 3, 18-jara dez. kor. kun fraŭlino.

Mia profesoro de matematiko — tio estis antaŭ 50 jaroj — montris al ni la diferencon inter la lernejo popola kaj meza, dirante: „Tie oni devas havi vin, ĉi tie vi devas havi nin." — Kaj ni komprenis. Parohestro Julius Axmann, Fraxern.

Eigentümer, Herausgeber, Verleger, verantwortl. Redakteur: Hofrat Hugo Steiner, Bisamberg, Bundesstraße 154. — Druck: Buch-, Kunst- und Zeitungsdruckerei „Albrecht Dürer", Wien, VII., Bandgasse 28.